


Esperanto *en Danio*

15-a jarkolekto • n-ro 1 • marto 2008



Aperis nova dana lernolibro

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

IŭN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Torben Svendsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40 eed@esperanto.dk

Presado: Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58 ina.schultz@get2net.dk

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.06.2008

Enhavo

Lande

Tago de la Gepatra Lingvo.....	3
Rezolucio de la UN-asocio.....	4
Jarraporto de DEA 2007.....	5
Kalkulaĵoj.....	17
Gazeteltondaĵoj.....	19

Loke

Kopenhago.....	20
Nova sekcio en Odense.....	22
Århus.....	23
Næstved.....	24

Monde

Du forpasoj.....	25
Internacia lingvoplanado.....	26
Anonco.....	27

Lande



MEMORU ALIĜI AL LA JARKUNVENO DE DEA 18-20-AN DE APRILO EN KOPENHAGO

- Festa enkonduko kun korusa kaj junulara programo
- Gastoj de Italio, Belgio, Svedio kaj Germanio
- Ekspozicio pri la cent jaroj de dana Esperanto-organiziteco
- Koncerto de JoMo
- Prelegoj de ges-roj Blanke, Corsetti, Löwenstein, Rude Andersen
- Vizito al Tivoli kaj ekskurso tra la urbo

NE MALTRAFU LA ŜANCON DE LA JARCENTO!!!!

Tago de la Gepatra Lingvo

Kunlabore kun la dana Gepatralingva Asocio (Modersmål-Selskabet) kaj la dana UN-Asocio, DEA aranĝis debatkunvenon la 21an de februaro en la sidejo de la UN-asocio. La debato pri la enlanda kaj eŭropa lingva politiko estis tre vigla. La UN-Asocio disdonis sian deklaron pri la graveco defendi la gepatran lingvon, kaj DEA kune kun Gepatraligva Asocio disdonis ankaŭ komunan deklaron pri la graveco de lingvaj homaj rajtoj kaj lingva diverseco.

La kunvenon ĉeestis proksimume 30 personoj, reprezentante krom la organizantojn ankaŭ la oficialan Danan Lingvokomisionon (Dansk Sprognævn), Amnestion Internacian, la komunumon de surduloj kaj DSFF (asocion de lingvoprofesiuloj).

Nia iniciato ebligis la du gravajn asociojn rilate al defendo de gepatraj lingvoj interesiĝi pri la tago kaj promesi estontan kunlaboron. Ni jam interkonsentis kun la Gepatralingva Asocio aranĝi la venontan lingvan festivalon en Kopenhago la 20-an de septembro.

Rezolucio de la UN-asocio

Ĵaŭdon la 21-an de februaro 2008 la Dana Asocio por la Unuiĝintaj Nacioj, la Dana Esperanto-Asocio kaj la Dana Gepatralingva Asocio kunvenis okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo per aranĝo en Kopenhago. Tiukaze la UN-Asocio adoptis la jenan rezolucion:

La rajto je la gepatra lingvo

La 21-a de februaro estante la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo markas la komencon de la Internacia jaro de Lingvoj.

Ĉiu homo devas havi la rajton parole kaj skribe uzi sian denaskan lingvon.

La kulturo esprimiĝas pere de la lingvo, sekve la lingvo havas decidan rolon rilate al homa identeco. Plue la gepatra lingvo estas grava faktoro por fortikaj familiaj konektoj, por komunikado kaj proksimeco inter la generacioj, kaj por la eblecoj de infanoj fariĝi aktivaj civitanoj.

Certeco pri la gepatra lingvo plifaciligas la lernadon de fremdaj lingvoj, kaj tial estas nejuste ke en Danio oni ne pligravigas la instruadon de gepatraj lingvoj, tiel ke la geknaboj, kiuj en siaj frua infanaĝo havas alian gepatran lingvon ol la danan, povos akiri certecon pri ambaŭ lingvoj.

En Danio estas valora riĉfonto, ke ni havas civitanojn kun malsamaj lingvaj kaj kulturaj fonoj, kaj ke multas flue parolas pli ol unu lingvon. La industrio postulas lingvajn kapablojn, kaj tiuj gravas por ke Danio povu agadi en la tutmonda socio. Komuna internacia lingvo, ekzemple la angla, estas necesa, sed ne sufiĉa por plene utiligi niajn internaciajn komercajn, politikajn kaj kulturajn kontaktojn.

La UN-asocio distancigas sin al la landoj, kiuj metas obstaklojn al minoritatoj uzi siajn proprajn lingvojn. Interalie temas pri la limigoj kontraŭ kurdoj en Turkio kaj kontraŭ romaoj en nombro da landoj. Endas, ke la internacia komunumo klopodu por la liberigo de homoj, kiuj jam estas persekutaj kaj malliberigitaj pro la uzado de siaj gepatraj lingvoj.

La UN-asocio instigas al Danio apogi la laboron en Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj por la konservado de lingva diverseco kaj aparte apogi la konservadon de lingvoj minacataj de formorto. Unesko taksas ke pli ol 50% el la 6000 diversaj lingvoj de la mondo endanĝeriĝas malaperi. La lingvo estas vojo al dialogo kaj kultura perado, do necesas rapide agi - kaj la Internacia jaro de lingvoj provizas estas bona okazo ekceli rezultojn.

Bona novaĵo por Google-uzantoj

Ĉu foje ĝenis vin ke vi ne povas trovi Esperantlingvan retpaĝon, ĉar la serĉvorto ankaŭ estas vorto en la itala, hispana, litova aŭ albana? Ne ĉagreniĝu plu, ĉar nun ekzistas Esperanta versio de tiu fama serĉilo. Iru al <http://www.google.com/webhp?hl=eo> kaj elektu “Serĉu paĝojn pri Esperanto”. Ĝi ne nur forfiltras la pliparton el paĝoj en aliaj lingvoj, sed ankaŭ redonas ĉiujn formojn de la Esperanta vorto (ekzemple se oni tajpas “interesa” oni ricevas ankaŭ “interesi”, “interesiĝi” ktp.).

Jarraporto de DEA 2007

La jaro

Nia agado en 2007 intensiviĝis en la tri agadkampoj: informado, instruado kaj utiligado pro la agado koncerne la jubilean jaron de KEK kaj DEA. Tiu intensiviĝo rezultis en plimultiĝo de nia membraro. Fine de 2008 estis registritaj 226 membroj. La jubileo de KEK en januaro aldonis plian informadon kun informaj artikoloj en du el la elstaraj danaj gazetoj kaj intervjuo de la prezidantino fare de la Dana Radio, P1. Tiu fakto kaj la ĉeesto en pluraj foiroj estis fruktodona, precipe en Odense, kie rezultigis komence de 2008 komencanta kurso kun 13 partoprenantoj kaj fondo de sekcio. Sed ankaŭ en Ålborg kaj Kopenhago oni povis rimarki la rezulton de niaj klopodoj.

Alia grava kampo estas la kontakto kun aliaj neregistaraj organizoj kun kiuj estas nature por ni kunlabori en la agadkampo de lingvaj homaj rajtoj. Ni sukcese eniris en kunlaboron kun la UN-Asocio kaj la Gepatralingva Asocio pri la Tago de gepatra Lingvo, kiu laŭ la deklaro de la Gepatralingva Asocio estos daŭre revenonta tradicio. Ni kunlaboras kun ili ankaŭ koncerne la venontan lingvofestivalon.

Antaŭ du jaroj estis starigita laborgrupo pri eldono de dana-Esperanta vortaro laŭ la Esperanto-dana vortaro de Eckard Bick. La laborgrupo komencis la tradukon kun la revo eldoni ĝin dum tiu ĉi jubilea jaro. Evidentiĝis ke estas vere granda laboro, kaj ni ankoraŭ ne estas certaj ĉu ni povos eldoni ĝin fine de la jaro, sed ni klopodas. Alia revo estis eldoni malgrandan historion pri la plej gravaj eventoj de nia centjara evoluo. Pri manko da fortoj ni prokrastis tiun taskon al la dua parto de 2008 kaj kolektis la fortojn por fari la ekspozicion dum nia jarkunveno.

Dum la jaro forpasis bedaŭrinde nia honora membro Sven Dragsted.

Fine mi prenas la okazon danki la estraranojn kaj ĉiujn fortojn kiuj kontribuis al nia prospero.

Informado

Esperanto en Danio

La revuo aperis 4 fojojn. Bedaŭrinde la presado ne plu povas okazi en Svedio pro teknikaj kaŭzoj, kaj meze de la jaro ni devis denove reiri al nia kutima dana iom pli multekosta presejo.

Informa materialo

Ni daŭre disdonadas la plurkoloran flugfolion, sed dum la foiroj ni ankaŭ disdonas kviz-folion kaj aliajn materialojn, kiel ekzemple la DVD eldonitan okaze de la UK en Florenco. La flugfolio estos verŝajne elĉerpita fine de la jaro kaj ni devos pripensi reeldonon.

Prelegoj

La 30an de majo 2007 Ileana partoprenis kun bildserio pri la movado en tre interesa kunveno organizita de studentoj de arkitekturo. Temis pri nova japana fenomeno: Pecha Kucha, kies celo estas malfermi dialogon kaj inspiron pri diversaj temoj inter la ĉeestantoj. Oni devis prezenti la temon pere de 20 bildoj.

Reage al la artikoloj pri la jubileo de KEK, la ĉefa dana radiostacio DR1 kontaktis nin kaj 16an de januaro Ileana estis intervjuita dum la programo „P1 formiddag“. Estis 50-minuta elsendo pri Esperanto kaj la postaj reagoj estis tre pozitivaj kaj rezultigis plurajn aliĝojn al kursoj por komencantoj en Kopenhago kaj en Odense.

Tago de Gepatra Lingvo

Ni sukcese aranĝis debatkunvenon la 21an de februaro 2008 kunlabore kun la dana Gepatralingva Asocio kaj la dana UN-Asocio, en la kunvenejo de tiu lasta. La debato pri la enlanda kaj eŭropa lingva politiko estis tre vigla. La UN-Asocio disdonis sian deklaron pri la graveco defendi la gepatran lingvon, kaj DEA kune kun la Gepatraligva Asocio disdonis ankaŭ kuran deklaron pri la graveco de lingvaj homaj rajtoj kaj lingva diverseco. Nia iniciato montriĝis esti la komenco de pli intima kunlaboro.

Gazetoj

Dum 2007 estis registritaj 40 mencioj de Esperanto en la dana gazetaro. La plej granda parto (14) estis tute hazardaj (ekzemple mencio de la restoracio “Esperanto” en Stokholmo). 9 temis pri personoj kun rilato al Esperanto (plejparte nekrologoj). 5 estas atribueblaj al la agado de la klubo en Næstved kaj 5 al aliaj DEA-sekcioj (inkluzive du grandajn artikolojn pri la jubileo de KEK en Politiken kaj Jyllands Posten). 4 artikoloj estis rezulto de lingvista agado (precipe la lanĉo de la retejo “sproget.dk”), kaj la 3 lastaj estis artikoloj pri la artista duo “La Loko” (nun bedaŭrinde dissolviĝinta) kaj pri PEN-kongreso kie partoprenis la Esperanta PEN. Krom artikolo en “Information” pri la Lingvofestivalo en Kopenhago, la plej favoraj mencioj estas tiuj kie oni ligas Esperanton al konkreta persono.

Hejmpaĝo

Ni daŭre klopodas por plibonigi la paĝojn enhave kaj stile, kaj komence de novembro 2007 estis starigita ebleco nombri la vizitantojn de la hejmpaĝo, kaj la servo pri sendado de mesaĝoj al DEA. Ni konstatis pli da intereso pri nia movado pere de tiu servo.

Esperanto-nyt

Raportas Ejnar Hjorth

En 2007 mi eldonis nur unufoje la danlingvan revuon ‘Esperanto-nyt’. Sed mi ricevis multajn bonajn respondojn kaj kelkaj deziras ricevi ekstrajn ekzemplerojn. Kaj daŭre oni povas mendi ekzemplerojn de malnovaj eldonoj. Pro la pli alta poshtpago, mi faras eble nur uno eldonon en 2008, sed ĝis nun estas sufiĉe da mono, ĉar multaj afablaj homoj sendis monon. Koran dankon pro tio.

Partopreno en ekspozicioj

Dum la jaro DEA partoprenis en jenaj aranĝoj:

- De la 28-a ĝis la 30-a de septembro DEA partoprenis kun budo ĉe la Socia Forumo
- La 15-an de septembro ni estis kunaranĝanto kune kun KEK de la lingva festivalo kunlabore kun la Gronlanda Domo.
- Dum la Kultur Nokto en Kopenhago la 12-an de oktobro ni aranĝis la ekspozicion, ĉi-foje en Magstræde kiu situas centre de la urbo. Ĝi allogis proksimume 80 personojn kiuj scivoleme trarigardis la materialon.
- Por la unua fojo en Odense ni ĉeestis en la foiro “Korpo-Menso-Spirito” (Krop-Sind-Ånd Messen) kiu okazis de la 5-a ĝis la 7-a de oktobro. Eĉ se tiu foiro ne havis tiel multe da vizitantoj kiel en aliaj urboj, tamen ni spertis sufiĉe da intereso kaj povis konstati grandan sukceson kiu evidentiĝis en aranĝo de kurso en Odense komence de januaro 2008.
- Fine, ni kune kun la Nordjutlanda Asocio partoprenis la “Krop-Sind-Ånd” en Europahallen en Ålborg, de la 4.-7. de marto.

Eksteraj rilatoj

DEA estas nun membro de la reprezenta komitato de la UN-Asocio, kaj tiu fakto multe influis al intensivigo de la rilatoj. Ankaŭ la kunlaboro kun la Gepatrolingva Asocio bone evoluis. Tiuj rilatoj respeguliĝis konkrete en kunlaboro pri komuna deklaro pri la Tago de la gepatra Lingvo kaj debatkunveno la 21-an de februaro en la sidejo de la UN-Asocio. DEA partoprenas ankaŭ en la estraro de la Kulturdomo en Dortheavej kiel anstataŭanta membro.

Instruado

Raporto de ILEI sekcio

Raportas Arne Casper

Nia sekcio ofte konstatis ke mankas al ni nova lernolibro por komencantoj. Tial la plej grava ago de la jaro 2007 estis definitive la traduko

de nova lernolibro por komencantoj, kies recenzon oni povas legi ĉi-numere. Temas pri la lernolibro de Stano Marček “Esperanto, la rekta Metodo”. La gramatika parto kaj la vortaroj estas tradukitaj de 3 IIEI-anoj, nome Liss-Lotte Talbro, Tara Gregers kaj Arne Casper. Ĉi-jare la lernolibro “Esperanto, den direkte Metode” finfine estas pretigita kaj eldonita.

Dana Esperanto Instituto

Raportas Lars Kromann-Jensen kaj Lene Niemann

Dum 2007 la nombro de kursanoj estas stabila, kaj ilia aktiveco estas tre diversa. Ni devas agnoski, ke pli kaj pli da homoj ŝatas lerni per la Interreto, kiu ofertas multajn kaj bonajn kursojn, sed ekzistas ankaŭ homoj, kiuj ŝatas paperon kaj la personan kontakton inter instruisto kaj lernanto, kvankam tiu kontakto ne estas klasĉambra.

Tiel longe, kiam ni havas bonan, taŭgan kurson, ni deziras oferti kiel ĝis nun, sed ni antaŭvidas, ke ne okazos multaj gravaj ŝanĝoj/plibonigoj.

En 2007 ŝanĝiĝis la poseda formalajo, tiel ke nun Lars Kromann, Bente Christensen kaj Lene Niemann kune laboras pri DEI.

Aplikado

Revu-kaj Libroservo

Raportas Arne Casper

Ankaŭ la jaro 2007 ne estis tiel prospera por la vendo de libroj, kaj ni denove konstatis ke ĝi stagnas. Ni provos instigi la intereson de nia membraro kaj akcenti la gravecon de nia apogo al tiu kampo.

Ĉefdelegita laboro

Raportas Arne Casper

La peradlaboro por la lastjara kongreso en Jokohamo ne estis tiel vigla, sed tiu por la venonta kongreso similas al la partopreno kiun ni havis en Florenco, ĉar denove ĉirkau 40 personoj aliĝis al Roterdamo.

Dana Esperanto-Junulara Organizo

Raportas Rasmus Høyrup Jensen

Denove jaro pasis, multe okazis, jen la junulara raporto pri tio:

Somere 2007 DEJO okazigis sian plej grandan eventon ĝis nun: 45 personoj partoprenis en la Roskilde-Festivalo kie ili dum ok tagoj volontule zorgis pri pruntita budo. En la budo ni repagis al la festival-partoprenantoj por kolektitaj boteloj kaj skatoloj.

Nia celo estis kunvenigi en Danio interesan kvanton da junaj esperantistoj el diversaj landoj. Tiel DEJO povis helpi montri la Esperantan mondon al danoj, kaj samtempe montri Danion al junaj esperantistoj el la mondo. Por akiri partoprenontojn ni elektis la Roskilde-Festivalon, la plej grandan muzik-eventon en la lando. La volontula laboro ebligis kunsporti faman danan muzikan eventon en malmultekosta maniero. Nia grupo estis preskaŭ duone danoj kaj duone eksterlandanoj. La projekto kunportis multe da laboro, sed malgraŭ manko de sperto kaj terura vetero ni sukcesis fari nian laboron en taŭga maniero. Ni esperantumis en la festivalo samtempe kaj samtempe la festivalo spertis esperanton!

Ni atingis la celon en Roskilde kaj aldone DEJO gajnis 15 membrojn kaj kelkajn milojn da kronoj. Ĉi-jare ni ankoraŭfoje partoprenos kun prunta budo, kiun ni prizorgos sammaniere.

Dum la jaro DEJO-anoj ofte organizis malgrandajn aranĝojn, kiel kaf-kunvenojn, kristnaskan lunĉon kaj somerdomajn semajnfinojn. En septembro estis la lingvofestivalo en la Gronlanda Domo, kie ĉeestis multaj junaj esperantistoj. En decembro aperis Fripone, la mordema teatraĵgrupo!

Aktuale ni partoprenas instruadon en du grandaj urboj en Danio. En Kopenhago Regin instruas ĉiulunde, en Århus Jonas instruis grupon en la universitato, kaj en Ålborg Rasmus instruas ĉiumerkrede. Ankaŭ Regin kaj Dennis partoprenas en la interesa projekto pri elektronika vortaro, ekzemple por poŝtelefonoj.

DEJO-anoj ankaŭ esperantumis eksterlande. Inter alie ni veturis al IJK

en Vjetnamio, IJS en Hungario, Festo en Francio, Oranĝa Renkontiĝo en Svedio, IS en Germanio, AS en Polando. Plue, Dennis eniris la Komitaton de TEJO, kio fortigas niajn eksterlandajn ligilojn.

Sume, DEJO havis bonan jaron. Ni kreskis iom, fortigis niajn internaciajn ligojn, kondukis grandan aranĝon, daŭrigis aliajn gravajn projektojn kaj gajnis niajn proprajn financajn rimedojn.

Dankon al ĉiuj membroj kiuj partoprenis en nia agado!

Jarraportoj de la Kluboj

Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago

Raportas Betty Chatterjee

Dum 2007 KEK havis 63 aktivajn membrojn, 2 pasivajn kaj 5 familiajn. Dum la jaro forpasis unu nia membro, nome Svend Dragsted. KEK sendis florkronon al lia entombigo.

En la pasintjara ĝenerala kunveno la nova prezidanto promesis al la membraro la jenon:

1. Ke ni plenumos la plenumoblajn planojn de la eksprezidanto kaj lia estraro.
2. Ke ni prizorgos la kluban ekonomion.
3. Ke ni atentos la lingvan kvaliton de niaj presaĵoj.

Ĉi tiu estraro klopodis por kvar ĉefaj projektoj:

- Vespera instruado de komencanta grupo en komunuma lernejo.
- Akcepto de la kopenhaga prikultura urbestro Martin Geertsen.
- Prelego de Ole Stig Andersen pri lingva politiko.
- La 2-a Lingvofestivalo en Kopenhago, kunlabore kun la Gronlanda Domo.

Ni sukcesis plenumi tri el ili; nur pri la vespera instruado komence de la jaro ni devis rezigni, ĉar tro malmultaj personoj aliĝis.

Dum la vizito de urbestro Martin Geertsen pluraj el la eksterlanddevenaj membroj rakontis pri siaj spertoj kiel novaj civitanoj en Danio.

Ole Stig Andersen ankaŭ akceptis la defion partopreni debatvesperon pri lingva politiko. Tiuvespere okazis vigla debato pri la utileco de Esperanto.

Okaze de la Lingvofestivalo estis diversmaniere reprezentitaj 20 diversaj lingvoj: prelegoj, lingvaj laborejoj, lingva konkurso, budoj kaj muzikumado. La evento estis filmita de la loka televido BLTV kaj private de Aleksandro Kogan. La festivalon inaŭguris la rumana ambasadoro per parolado kiu prezentis la rumanan lingvon. Vendrede la 14-an de septembro la gazeto 'Information' aperigis treege favoran artikolon de Ole Stig Andersen pri lingvo-festivaloj kaj pri Esperanto. La artikolo estis tradukita de Jens Larsen en Esperanton.

Kursoj kaj studgrupoj

La unua studgrupo gvidata de Lene Niemann kaj Bent Wiinberg daŭre legis la libron 'Faktoj kaj Fantazioj'. La dua studgrupo de Arne Casper-Mortensen okupiĝis pri la frua historio de la dana Esperantomovado. De februaro ĝis junio funkciis unu grupo de lernantoj gvidata de Betty Chatterjee kaj Eugeniusz Rybarczyk. Aŭtune ekfunkciis grupo de komencantoj (8 personoj) gvidata de Jens S. Larsen kaj grupo de daŭrigantoj gvidata de Regin Larsen. Komence de 2008 ekfunkciis plia grupo de komencantoj (7 personoj).

Prelegoj kaj aliaj aranĝoj

Jytte Sunekær printempe prelegis pri la okazonta UK en Japanio, por instigi pli multajn membrojn aliĝi al la kongreso.

La unua preleganto en la nova klubejo estis Mogens Rude Andersen, kiu distris nin per la demando 'Ĉu vi scias, kio estas via V.K.?' (=vortokvocianto).

Rodica Todor, prezidanto de la Rumana Fervoĵista Esperanto-Asocio, prelegis pri siaj lando kaj kulturo.

Kiel kutime okazis Somermeza Aranĝo, aranĝita de Henning kaj Karen Olsen.

Ĉi-jare oni somere ekskursis al Elsinoro, kie Lene kaj Jan Niemann gastigis la membrojn kaj ĉiĉeronis ilin tra la urbo.

KEK partoprenante la Internacian Tagon la 9-an de septembro spertis sufiĉe grandan intereson de la preterpasantoj.

Jan Niemann prezentis la temon - 'Apliko de esperanto en scienco kaj tekniko.'

Montrante multegajn bildojn Bent Jensenius prelegis pri la nevidabla miraklo – la elektro.

Ole Therkelsen prelegis pri Vivĝojo kaj nenatura laceco.

Prezidanto de ILEI Radojica Petrovic prelegis pri sia laboro.

Jan Niemann prelegis pri la 'Deklaro pri internacia lingvo de Hokan Lundberg: Ĉu la angla lingvo estas 'La Malamiko' aŭ helpilo en la nuna mondo – prezento de NIA lingvo de alia vidpunkto!

Jytte Sunekær parolis pri la historio de DLEA, Dana Laborista Esperanto Asocio.

Jan Niemann prezentis malnovajn bildojn de Poul Thorsen.

Dennis Priskorn instruis al ni la ĝustan manieron uzi Vikipedion.

Ann-Louise Åkerlund prelegis pri siaj vojaĝoj per aŭto-karavano.

Multaj el ni somere partoprenis en diversaj internaciaj kongresoj. Dum pluraj klubkunvenoj la partoprenintoj informis pri siaj belegaj spertoj en ekzemple Japanio, Slovenio, Pollando kaj Vietnamio.

Mogens Rude Andersen, Ileana Schøder kaj Betty Chatterjee aŭtune prelegis pri la frua historio de la dana movado en Danio.

Ni ne forgesis la gravan tradician aranĝon – Numerludo!

KEK kaj la Kopenhaga Kulturgrupo kunlaboris pri la Zamenhoftaga festo, kiun ni celebris en la kunvenejo de la Kulturgrupo en Frederiksberg.

Klubejo

Ĝis junio la klubejo troviĝis en Kalvebod Brygge. La ejo estis sufiĉe granda, sed bedaŭrinde sufiĉe malkomforta. Tial kiam DEA trovis oficejon en la kulturdomo kaj povis oferti al ni klubejon, ni kaptis la ŝancon translokiĝi.

Tiu ĉi jaro jam estis granda defio sed ni tamen havis kelkajn sukcesojn.

Fine mi volas danki la estraron de DEA, KEK kaj aliaj klubanoj pro la apogo.

Esperanto-Unuiĝo de Næstved

Raportas Grete Nielsen

Kion raporti pri la pasinta jaro, kiu ja ne estis H.C.Andersen-jaro kaj tial ne enhavis specifajn taskojn por ni. Ni estas la samaj homoj en la unuiĝo kaj havas la samajn kunvenojn sen sukceso renovigi ilin – tamen dankon pro kontinueco.

Kiel ni agis dum la lastpasintaj jaroj, ni denove al la publiko ofertis plurajn danlingvajn prelegojn – kun sukceso oni povas diri pensante al la loka reklamo en gazetoj kaj kelkfoje en loka radio.

Temas pri jenaj: Ole Therkelsen pri Martinus kaj Darwin, Lene Niemann pri mondaj heredaĵoj, Palle Artmann pri framasonismo, Lene kaj Jan Niemann pri urba evoluo en Gronlando kaj Jørn Dysted pri vojaĝo al St. Croix. Ĉiuj temoj interesaj, ekzemple la prelego de Ole Therkelsen kaŭzis plenŝtopitan kunvenejon. Antaŭ la prelegoj ni kune manĝis dank’ al Bente.

Dum la ordinaraj klubkunvenoj – vespere aŭ posttagmeze – ni laboris laŭ la ŝatata legolibro de Marjorie Boulton *Faktoj kaj Fantazioj*. La antaŭnovjara sezono finiĝis per lunĉo la 14-an de decembro, en kiu partoprenis ankaŭ DEFA-anoj.

La somera ekskurso en junio al *Malerklemmen* estis benata per bela, varma vetero – tute eksterordinare en la jaro 2007.

La poŝta reklamilo *Esperanto – et mellefolkeligt sprog* funkciis en 2007 alterne en kvar poŝtaj centroj. Pri 2008 ni en la momento de verkado de ĉi tiu raporto ne konas la datojn.

Esperanto-nyt estis en oktobro sendita al proksimume 80 adresoj (bibliotekoj kaj medioj). Nia *Novaŝletero* aperis 4-foje, la estraro kunvenis 2 fojojn, nombro de aranĝoj estis 17 (1 nuligita), kaj meza nombro de partoprenantoj estis 9,5. La unuiĝo havas je la fino de la jaro 21 membrojn.

Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis nian agadon.

Århus Esperanto-klubo

Raportas Stanisław Mielczarek

Esperanto-klubo de Århus havas nun 31 membrojn. Nia tre konvena kaj senpaga kunvenejo en Senior-Centret, kies estontecon ni ne konis pasintjare, estas savita. La Urba Konsilantaro de Århus lasis sian ideon vendi la konstruaĵon por enspezi en la ŝparigendan urban kason iom da milionoj da kronoj. La gvidantaro de Senior-Centret aranĝis komence de la jaro grandan kunvenon, kie mi reprezentis nian klubon. Venis multaj ideoj, por ke Senior-Centret estu pli populara, pli uzata de ni kaj pli rimarkenda de la instancoj.

En la 2007-a jaro estis planitaj 9 kunvenoj. Bedaŭrinde la oktobra kunveno ne okazis. Eble la klubanoj forgesis ĝin. Ankaŭ la tradicia Zamenhof- kaj Kristnaskovespero ne okazis pro la forvojaĝo de kelkaj klubanoj.

La somera ekskurso 2007 gvidis nin al du arhusaj muzeoj – La Okupacia Muzeo (Bættelsesmuseet), Virinmuzeo (Kvindemuseet) kaj La Japana Ĝardeno (Zen Garden, Danmarks Japanske Have). La vetero estis bona, do la ekskurso ankaŭ estis sukcesa.

Ni finis tiun agrablan dimanĉon en la ĝardeno de la gesamideanoj Robinson, kie ni povis babili ĝuante kafon/teon kun kukoj.

Dankon al Bodil kaj Arthur Robinson por la gastameco kaj al Grethe Kvist por la bakita kuko.

Koran dankon al vi ĉiuj por la bona kunlaboro en la jaro 2007!

Nortjutlanda Esperanto Klubo

Raportas Ejnar Hjorth


En Nordjutlanda Klubo estas nun 30 membroj. Ni havas esperanto-kursojn por kaj komencantoj kaj progresintoj.


Ankaŭ en 2007 ni partoprenis la ekspozicion en Aalborghallen, 'Sind, Krop og Ånd'. Ni disdonis broŝurojn, ekzemplerojn de 'Esperanto-nyt' kaj kvizon. Multaj akceptis la kvizon kaj ni ricevis 12 adresojn al kiuj mi sendis premion: la libro 'Sprog og Sprog imellem' de Preben Bagger, la unuan kajeron de 'Esperanto lau metodo Friis' kaj inviton al

kurso. La rezulto estis, ke tri kursistoj komencis lerni la lingvon. Do, mardon vespere, ni havas kurson por 5 komencantoj. Mercredon posttagmeze renkontighas 7 membroj por paroli esperante kaj diskuti gramatikon kaj aliajn temojn.


Noll regnskab 2007


<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>	<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
4% af DEAs individuaj og gaver	276,00	Gravsted	739,37
Renter	<u>2.272,00</u>	Gravsten	4.980,00
		Tilskud	258,00
		Kurstab	<u>2.755,00</u>
I alt	2.548,00		8.732,37
Årets underskud	6.184,37		
I alt	<u>8.732,37</u>	I alt	<u>8.732,37</u>
<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>	<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer	51.727,76 ^v	Egenkapital 1/1 2007	56.612,49
		Årets underskud	<u>-6.184,37</u>
Bank	<u>3.680,36</u>	Egenkapital 31/12 2007	50.428,12
		Kreditorer, DEA	4.980,00
I alt	<u>55.408,12</u>	I alt	<u>55.408,12</u>


Heana Schrøder
Formand


Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden


23.02.2008

Revisor

23/2-2008

Revisor


DEAs regnskab 2007

<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>	<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
Klubber kontingent	15.055,00	Administration	1.169,96
Individuaj	6.900,00	Gebyrer	341,00
DEJO	2.145,00	UEA og EEUkontingent	1.760,75
Gaver	47.011,80	Arrangementer	10.681,30
Renter	<u>4.847,04</u>	Årsmøde udgifter	1.441,00
I alt indtægter	75.958,84	E. en Danio	12.000,50
Årets resultat DEA	<u>33.905,50</u>	Repræsentation	140,00
		Tilskud	7.810,00
		Bestyrelsesmøder	256,00
		Kurstab	5.482,43
		4% til Noll	276,00
		Libroservo	<u>694,40</u>
	<u>42.053,34</u>	I alt udgifter DEA	<u>42.053,34</u>

<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>	<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer	76.772,01	Egenkapital primo	161.420,10
Libroservo	35.503,02	Årets resultat DEA	<u>33.905,50</u>
UEA kontoen	552,75	Egenkapital ultimo	195.325,60
Bankindstående	92.521,82	DEJO kapital	19.397,00
Debitorer	6.558,00	Kreditorer	<u>1.000,00</u>
Årsmøde 2008	<u>3.815,00</u>		
	<u>215.722,60</u>		<u>215.722,60</u>



Ileana Schrøder
Formand




Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den 23.02.2008.



Lars Kromann Jensen
Revisor



Tara Gregers
Revisor

Gazeteltondaĵoj

Oktobro 2007: Prelego de Jørn Dysted pri St. Croix menciita 4-loke en Næstved-komunikiloj.

Novembro 2007: Berlingske Tidende Magasin: Wikipedia kaj Esperanto.

Natur og Miljø: Birda Esperanto.

FN-forbundets Nyhedsbrev: Artikolo de Ileana Schrøder.

Ugebladet Næstved: Asocia registro, i.a. kun la Esperanto-Unuiĝo.

Decembro 2007: Sprog & Samfund: 2007 estis bona lingva jaro (menciis i.a. la lingvan festivalon, kiun kunaranĝis DEA).

Januaro 2008: Stempel-info rilate la stampilon Esperanto – et mellemfolkeligt sprog dum 2008.

Programo de Radio Vatikano pri Esperanto-elsendoj.

Politiken Kultur: Klio signifika esperanto? (Tia vere estas la titolo!).

Prelego de Sisse Gry Olsen kaj Mads Ringblom pri Sirio menciita 4-loke en Næstved-medioj.

Jyllands-Posten: 'Esperanto – det internationale sprog' pri 100-jara KEK-jubileo.

Lollands-Posten: På Lolland tales der ikke esperanto.

Februaro 2008: Weekend-Avisen, kroniko: English, oh yes!

Prelego de Ole Ingstrup pri kanadaj indianoj menciita 4-loke en Næstved-komunikiloj kaj Berlingske Tidende, AOK – ankaŭ intervjuo en loka radioprogramo.

Ugebladet Næstved: Asocia registro, denove kun mencio de la Esperanto-unuiĝo.

Krucvortenigmo en Information kun la vorto Esperanto.

Information: De sproglige menneskerettigheder (mencio de aranĝo, en kiu partoprenis DEA).

Daŭre memoru sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved

Kopenhago

Centjara jubileo de KEK

La 6-an de januaro Kopenhaga Esperanto Klubo festis sian 100-jaran jubileon. Antaŭtagmeze oni vizitis la tombon de Marie Schrøder, unu el la ĉefaj fondintoj de la Klubo antaŭ 100 jaroj. Ĉe la tombo la prezidanto de KEK Betty Catterjee estis intervjuita de la loka televido.

Posttagmeze okazis la jubilea festeno en la salono de la Kulturdomo Nordvest, kie KEK havas sian kunvenejon. Post la lunĉo sekvis koncerto de la dana koruso TAP, kiu kantis danajn kantojn esperantigitajn kaj kune kun la ceestantaro finis la programon kunkantante la danan, eŭropan kaj Esperantan himnojn.

La sukcesa programo pludaŭris kun la prezentado de la tutmovade fama trobadoro, verkisto kaj poeto Mikaelo Bronŝtejn, kiu kantis ne nur pri sia devenlando, sed ankaŭ pri pluraj aliaj temoj.

Okaze de la jubileo Jyllandsposten kaj Politiken havis artikolojn pri Esperanto, la loka televido faris 30 minutan programon pri la tago kaj la unua programo de la dana radio invitis la prezidantinon de DEA Ileana Schrøder kiel ĉefa gasto al 50 minuta elsendo la 11-an de januaro, kies temo estis Esperanto. La programo evidentiĝis fruktodona, ĉar pluraj personoj post la elsendo esprimis deziron lerni Esperanton.

Aleksandro Kogan surretigis filmetojn pri pluraj lastatempaj Esperantoagadoj en Kopenhago, inter kiuj aparte menciindas la kompleta prelego "Legendoj pri SEJM" de Mikaelo Bronŝtejn en KEK kaj la pasintjara Lingva Festivalo en Kopenhago. La adreso estas <http://video.google.com/videoplay?docid=944723061957913833>.

Printempa Programo 2008

Ĉiuj aranĝoj de Konversacia Esperanto-Klubo regule okazas en la kulturdomo, Dortheavej 61, 2400 Kopenhago, ekde la 19:30h ĉiulunde. Eblas aĉeti vespermanĝon kaj trinkaĵojn en la kafejo de la kulturdomo.

17 marto: Henning Olsen prelegos pri la temo: **DEFA** 60 jaroj krokize tra la jaroj.

24 marto: La klubo estas fermita pro **Pasko!**

31 marto: "Kion esperanto signifas por ni"; **blindaj esperantistoj** rakontas. Prelegos Søren Willemoes Jørgensen kaj Lars Pilegård.

7 aprilo: **Aŭkcio**. Printempas! Donacu ian brokantaĵon! Priskribu ĝin! Iĝu aŭkcianto! Eugeniusz Rybarczyk instruos al ni la aŭkcian arton. La monkasos de KEK antaŭdankas vin pro la kontribuoj!

14 aprilo: Studgrupo Faktoj kaj Fantazioj.

18-20 aprilo: La centjara datreveno de **DEA**.

21 aprilo: La klubo estas **fermita**.

28 aprilo: **Bent Jensenius** prelegetos kaj grupa babiligos pri "Miaj lingvaj travivaĵoj tra la mondo, kaj kiel mi fariĝis esperantisto".

5 majo: **Abdoulaye Faye** de Senegalo vizitos la klubon. Abdoulaye portempe loĝas en Bydgoszcz Pollando, kie li studas turismadon..

12 majo: La kulturdomo estas fermita okaze de Pentekosto. Tial ni ekskursu! La **ekskurso** iros al Anna kaj Erik Hansen, Poppellunden 26, 4270 Høng, kiuj atendas nin kaj ofertas lunĉon. Proksime estas muzeo, vidu www.kunstnergaarden.dk, kaj ekspozicio de ceramikaĵoj. Informiĝu ĉe Jytte, rete jytte.sunekaer@mail.tele.dk, telefone 4448 4726.

19 majo: Studgrupo, Faktoj kaj Fantazioj.

26 majo: Studgrupo.

2 junio: Nina Tofte Hansen de DEJO prelegos pri **evolu-landoj**.

Ekologio populariĝas en Eŭropo, sed ĉu la ekologiaj principoj ankaŭ ofertas solvojn al malriĉaj agrikulturistoj en Afriko? Tiun demandon studis Nina dum sia vizito en Ugando pasintsomere kaj nun rakontos pri la interesa kaj multrivela vojaĝo."

9 junio: Studgrupo, Faktoj kaj Fantazioj

16 junio: Prelego de Regin Larsen: **Reta sekureco/malsekureco**.

23 junio: Studgrupo

30 junio: Somermeza **fest**o.

Ĝis revido komence de aŭgusto!

Nova sekcio en Odense

En oktobro de 2007 DEA partoprenis en la foiro "Korpo-menso-Spirito" en Odense. Tie ni sukcesis interesigi 6 personojn, kiuj deziris lerni Esperanton.

Antaŭe mi disdonis multajn flugfoliojn kiel reklamo por stablo de Esperanto-klubo en Odense. Por plifaciligi la laboron, mi interkonsentis kun la prezidento de DEA ke la klubo estu sekcio de DEA.

Post la foiro mi distribuis la restantajn flugfoliojn en la atendoj de miaj dentisto, kuracisto, piedisto, frizisto, naĝbanejo ktp. En la hejmpaĝo de DEA mia

nomo estis enmetita kiel kontaktulo por Odense.

Entute aliĝis 15 personoj al la kurso por komencantoj: 6 personoj pere de la foiro, 3 per la Interreto, 4 per flugfolioj, 2 pro la januara radiodisaŭdigo en kiu Ileana estis intervjuita.

La kurso komenciĝis la 15an de januaro 2008. La grupo estas mirinda, kun lernantoj de diversaj aĝoj kaj fundoj. Ilia sola komunaĵo estas la intereso lerni Esperanton.

Ni kunvenas merkrede, kaj mi esperas ke la sekcio iom post iom kreskos.

Liss-Lotte Talbro

Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Søndervangen 10, 1.th., 8260 Viby J.
Tel.: 86 29 23 06, rete: stanislaw@forum.dk. Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C. Kunvenoj: lasta (kun esceptoj) ĵaŭdo de ĉiu monato je la 19:30 h.

Okazos

- 27.03: La vojaĝema Nikoline Fiora rakontos kaj montros lumbildojn pri unu el siaj vojaĝoj.
24.04: Venu kaj eksciu iom pri junularaj aranĝoj, kiujn partoprenis Jonas Dalmose. Li montros ankaŭ bildojn.
29.05: Henry Simonsen disukutigos nin pri la situacio en la mondo.
07.06: Somera ekskurso

Okazis

- 10.01: Eksterordinara kunveno. Nian klubon vizitis lerta rusa esperantisto, nome Mikaelo Bronŝtejn. La temo de lia prelego estis: "Retrospektivo de rusaj festoj". Jes, la rusoj ŝatas festi: dufoje la Novan Jaron (laŭ du kalendaroj), ekleziajn, paganajn, fakulajn festojn ktp.
Prezantante sian poezion, librojn kaj diskojn, ludante je la gitaro kaj kantante en diversaj lingvoj, la rusa samideano igis tiun vesperon vere ujutna.
- 28.02: Ĝenerala kunveno. La klubo nombras nun 31 membrojn. La aktivecoj, pro la aĝiĝo de la membraro, ne estas multaj, sed tamen ĝi ekzistas. Jen la estraro: Stanisław Mielczarek, Grethe Kvist, Nikoline Fiora, Luja Miletić, Søren Dalmose, krom Henry Simonsen kiel anstataŭanto. La revizoroj: Jørgen Kristoffersen kaj Arthur Robinson. Tove Jyding daŭrigos kiel revizora anstataŭanto.
La estraro de la Fonduso de Betty Jensen estas jena: Stanisław Mielczarek, Grethe Kvist, Søren Dalmose. La revizoroj estas: Arthur Robinson, Jørgen Kristoffersen. Tove Jyding estas revizora anstataŭanto.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel. 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. Kun venoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111, ordinare je h 19.30.

Okazos

Ve 28.03: Sezonfina aranĝo. Ni planas 'fromaĝ-tablon' kun ruĝa vino + diversajn ludojn kaj babiladon. Antaŭĝoju ujutnan vesperon.

Same ni planas somerekskurson al Køge kun vizito al la tiea *mini*-urbo sabate la 7-an de junio. Kelkaj detaloj ankoraŭ ne estas pretaj. Pri pliaj informoj kontaktu la sekretarion.

Okazis

14.12.07: Jul-aranĝo en nova maniero, nome posttagmeze kun abunda lunĉmanĝado kaj lotumado de kunportitaj donacetoj.

11.01.08: Danlingva prelego de Sisse Gry Olsen kaj Mads Ringblom pri iliaj travivaĵoj en Sirio. Ege interesa kaj anoncita al la publiko kun certa sukceso.

08.02.08: Ole Ingstrup rakontis verve kaj atentostreĉe pri siaj jaroj en Kanado, kie li agis kiel gvidanto de la mallibereja sistemo precipe inter la indianoj, kies kulturo ja estas jarmilojn pli aĝa ol la eŭropa kaj pro tio multe pli atenta al la medio kaj la diverseco de la homa naturo. Sekve la konduto al la malliberuloj estu edukado fare de saĝuloj pli ol simpla enmeto en karcerajn ĉelojn. Granda publiko – laŭ niaj normoj – ĉeestis.

29.02.08: Pro diversaj kaŭzoj ni tiun vesperon aŭskultis prelegon de Birthe Trærup pri la ĉeĥa komponisto Bedřich Smetana. Detalriĉa kaj kun muzikaj provoj de lia eminenta priskribo de sia patrolando – al multaj estas precipe konata la kirlo de la rivero Vltava (kiun ni plej ofte nomas laŭ la germanlingva nomo *Moldau*). Ĉar ni ne sukcesis funkciigi la televidilon, ni devas antaŭĝoĵi alifojan ĝuon de videoekzemploj.

Nia komenciĝanta kunvena kunlaboro kun DEFA rezultigis jaŭdan kunvenon meze de februaro kun lumbilda rakonto pri vojaĝoj fare de Lene kaj Jan Niemann. Niaj kunvenoj kun pritrakto de ĉapitroj de *Faktoj kaj Fantazioj* iom lamis ĉi-vintre.

Monde

Du forpasoj

Komence de 2008 forpasis du internacie konataj elstaraj esperantistoj: Claude Piron en Svisio kaj Don Harlow en Usono.



La 22-an de januaro en sia hejmo en Gland, en la aĝo de 76 jaroj, pro koratako forpasis Claude Piron. Li naskiĝis 1931 en Namur, Belgio. En sia junaĝo li estis tradukisto por Unuiĝintaj Nacioj. Posteninte ĉe UN, li poste laboris por Monda Organizaĵo pri Sano tra la mondo. Poste li estis psikoterapiisto kaj instruis en la psikologia fakto de Ĝeneva Universitato (Svisio) de 1973 ĝis 1994.

Piron verkis multe en Esperanto, inkluzive nombron da detektivaj romanoj sub la pseŭdonimo Johán Valano. Multaj komencantoj konas lian plurfoje reeldonitan *Gerda malaperis*, kaj li ankaŭ eldonis la muzikan kasedon *Frandu Piron*. Kelkaj liaj verkoj estis tradukitaj al aliaj lingvoj. Li estis laŭreato de Belartaj konkursoj de UEA, membro de la Akademio de Esperanto, ricevis la premion de OSIEK (1998) pro la libro *La bona lingvo* kaj la premion Deguĉi (1993), kaj estis honora membro de UEA ekde 1998.

La retejo Edukado.net starigis kondolenc-paĝon memore al Claude Piron. Konversacia Esperanto-Klubo en Kopenhago honoris lin per memorgesperoj la 25-an de februaro.

La 27-an de januaro, post longdaŭra malsano, en Kalifornia hospitalo forpasis la konata usona esperantisto Don Harlow. Li aktivis interalie kiel prezidanto de *Esperanto USA* kaj kiel redaktoro de ĝia samnoma gazeto. Li estis konata ankaŭ kiel verkisto, tradukisto, recenzisto, kaj redaktoro de antologio kaj kreinto de granda reta kolekto de Esperanto-literaturo. Ekde la pasinta jaro, ekzistas la premio Harlow por elstaraj tradukoj el la usona literaturo en Esperanton.



Internacia lingvoplanado

La Eŭropa Komisiono komisiis al tiel nomita “Grupo de Intelektuloj por Interkultura Dialogo”, estrata de Amin Maalouf, raporti pri la temo “Kiel lingva diverseco povus fortigi Eŭropon”, esplori pri la ligoj inter lingva diverseco kaj Eŭrop-unia identeco. La rezulta 30-paĝa raporto aperis en februaro. Unu el la ĉefaj ideoj de la raporto estas, ke en ĉiuj EU-landoj devus esti fluaj parolantoj de ĉiuj EU-lingvoj, kaj ke rilatoj inter ajnaj du EU-landoj devus baziĝi sur la lingvoj de tiuj du landoj, ne sur komuna pontolingvo. Samtempe la raporto klare akceptas kiel elirpunkton la rolon de la angla ĝuste kiel tia pontolingvo. Laŭ pluraj esperantistoj, kiuj tralegis la raporton, la raporto estas interesa, sed apenaŭ progresiga laŭ lingvodemokratia vidpunkto.

La Maalouf-raporto ie asertas ke la uzo de la Angla kiel “internacia komunikilo” ne estas avantaĝa al la Angla lingvo mem. Tio povas esti vera laŭ strikte naciaj kriterioj... kaj se oni pretervidas ke ekzistas ne nur kultura naciismo, sed ankaŭ kultura imperiismo, tiam oni povas prezenti la disvastigon de la Angla lingvo kiel ”donacon” al la mondo. Ĝuste tion faris la brita ĉefministro Gordon Brown, kiam la 17-an de januaro li, antaŭ ol ekvojaĝi al oficialaj vizitoj en Barato kaj Ĉinio, en paroladeto prezentis novan lingvoportalon por tutmondaj instruistoj de la angla lingvo.

En Britio Esperanto preskaŭ malaperis el la publika imago nuntempe, sed en Germanio, interese, estas tute inverse. Ekzemple la prestiĝa semajna gazeto ”Die Zeit” publikigis fine de 2007 jarresuman ĉefartikolon ”Ludo sen limoj” kiu komparis la 20 plej grandajn internaciajn projektojn kiuj celas solvi enigmojn de la naturo aŭ utili al la homaro, en kvin kampoj: fiziko, kulturo, biologio, spaco kaj medio. Kiel unu el la kvar plej gravaj internaciaj projektoj en la kampo ”kulturo” oni elektis Esperanton, kun bildo de Zamenhof. Malgraŭ tio, la prezento de niaj lingvo kaj movado estis iom malpreciza, sendube ĉar ĉi tiu bona reputacio de la Internacia lingvo estas relative nova fenomeno en Germanio.

JSL

Anonco

Esperanto – den direkte metode

Nova lernolibro por danaj komencantaj lernantoj estas nun eldonita kaj akireblas ĉe la LibroServo de DEA (vidu frontpaĝe!)

En 2006 la redaktoro de Revuo Esperanto Stano Marcek eldonis la lernolibron 'Esperanto Per Rekta Metodo', ilustrita de lia filino Linda Marcekova., - kaj hodiaŭ ĝi estas eldonita en pli ol 15 lingvoj, - nun ankaŭ en la dana.

Pri la libro skribas Katalin Kováts en www.edukado.net interalie:

La 22-leciona instrumaterialo konsistigas kompletan lernolibro kaj akompanajn materialojn en la formo de 500 ilustraĵoj (A5-formataj desegnitaj, kartonaj, senkoloraj bildkartoj de la kursomaterialo), enhavanta la saman bildoserion en formo de unu granda PDF-dokumentoj.

La ilustraĵoj kun la racie aranĝitaj indeksoj kaj titoloj facile uzeblas. La aldono de la du helpiloj estas valora kompletigo de la pakajo. Kompreneble la eroj aĉeteblas ankaŭ aparte.

La lernolibra vortprovizo respektas la vortoliston, kiun la Akademio rekomendas por ĉiuj lernilobroj de Esperanto. Ĝi ĉerpas la 750 pleje uzatajn vortradikojn (komence la plej ofte uzatajn ktp). La komprenon de la leksikaj elementoj helpas ne nur nacilingvaj vortolistoj, sed ankaŭ la paĝgrandaj filmstrieckaj desegnaĵoj, en kies kadroj aperas ilustraĵoj de la leksikaj aŭ gramatikaj eroj.

La aŭtoro prilaboras la plej gravajn prepoziciojn kaj afiksojn, la problemon de -ig, -iĝ, participojn kaj refleksivon, kaj kaj multajn ĉiutagajn paroltemojn. La tekstoj estas priskribaj, monologaj kaj inter la didaktikcelaj materialoj legeblas ankaŭ proverboj, kelkaj fabeloj kaj literaturaĵoj.

La ekzercoj legigas, skribigas, respondigas kaj atentigas pri parkerigindaĵoj. Utila parto estas la librofina parto 'La ĉiutaga Esperanto', en kiu troveblas laŭtemaj listoj de plej oftaj parolturnoj de la lingvo. Kvankam ene de la libro ne troveblas informoj pri la movado, antaŭ la ferma enhavtabelo la aŭtoro donas liston de E-klubo kaj de kelkaj (inter)aciaj retejoj.

Jubileo de KEK kaj Gepatralingva Tago



TAP kantas ĉe la jubileo de KEK



Neesperantistoj en la debato...



Lastmomenta foto de la kuko



... esperantistoj samloke...



“Bruna Ŝtono” trobadoras



... kaj jen miksitaj grupo.